

Johann Wolfgang von Goethe,  
Limoj de l'homaro

*tradukita de Alexander Taussig*

Se la praega  
Sankta la patro  
.....  
El nuboj rulsonaj  
Sendas fulmbenojn  
Super la teron,  
Mi de l'vestaĵo  
Lia la randon  
Kisas timeme,  
Fidon en brusto.

Ĉar kun la dioj  
Sin ne komparu  
Homa estaĵ'!  
Se lia verto  
Tuŝas la stelojn  
Tiam nenie  
Plandoj malcertaj  
Povas sin kroĉi  
Kaj kun li ludas  
Nuboj kaj ventoj.

Se li kun ostoj  
Firmaj, fortikaj  
Staras sur tero  
Daŭre fondita,  
Li ne kapablas  
Eĉ sin kompari  
Nek kun la kverko  
Nek kun la vito.

Kio distingas  
Diojn de l'homoj?  
Ke antaŭ tiuj  
Migras ondaro,  
Eterna torent':  
Ondo nin levas,  
Ond' nin englutas,  
Ni alfundiĝas.

...

Rondo malvasta  
Vivon limigas  
Nian kaj multaj  
Generacioj  
Daŭre viciĝas  
Al ĉeno senfina  
De la ekzisto.

*Traduko de la Germana poemo "Grenzen der Menschheit" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de ALEXANDER TAUSSIG (\*1865-08-24).*

*Arg-493-961 (2009-08-17 13:25:21)*

*Pri la tradukinto Alexander Taussig vidu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Alexander\\_Taussig](http://eo.wikipedia.org/wiki/Alexander_Taussig). Lia traduko troviĝas en [www.literaturo.dk](http://www.literaturo.dk), en <http://www.literaturo.dk/limoj.htm>.*